
# DIA REGNO

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

* dumonata kristana revuo en esperanto * n-ro 6 (867) * 2007 *



Detalo el vintra pentraĵo de Carl Larsson, sveda pentristo

# KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- * Membro-subtenanto €30,- * Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- * pagante al Libroservo €18,- * Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. * Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI * Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Enmalriĉeco - la gloro de Dio | 127 |
| Ofendo aŭ liberiĝo | 128 |
| Ĉu esperantistoj esperigas esperantojn | 129 |
| Kristo – elstara pedagogo | 135 |
| Al kiuj sanktuloj oni preĝas en Ruslando kaj kial? | 137 |
| Forto el patrina amo | 140 |
| La tempo flugas... | 141 |
| Germana memortago | 145 |
| Informetoj | 147 |
| Anonima medito | 148 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Jam estas decembro kaj la festo de Kristnasko alproksimiĝas rapide. Plejmultaj el ni certe estas forte okupitaj de multaj 'devoj' por aranĝi belan feston al niaj familioj aŭ proksimuloj. Kelkfoje mi havas la senton ke kristnasko, kiu devas esti ĝojplena festo, ofte ankaŭ kunportas seniluzion, ĉar niaj esperoj pri la festo ne plenumiĝas kaj pro granda laceco ni ne povas trankvile aŭskulti kaj akcepti la kristnaskan ĝojplenan mesaĝon.

La jena numero de Dia Regno ankaŭ estas la lasta numero de tiu ĉi jaro. Mi kaj Pavel Polnický, kiu dissendas 'Dia Regno'-n al vi, ni volas deziri al vi trankvilan, kristcentran kaj:

*belan kristnaskon kaj*
*feliĉan novan jaron!*

Sekvontjare mi provos, espereble kun via helpo, iom speguli la 100-jariĝon de nia gazeto Dia Regno.



# En malriĉeco - la gloro de Dio

## Pensoj de Jozefo Farkas vespere la 24-an de decembro 1961

Tradukis Éva FARKAS-TATÁR, HU

Ĉiuj niaj festoj enhavas iun specialan etoson kaj disradiantan benon. Sendube el ĉiuj niaj festoj ĝuste kristnaske plej multe senteblas lumo kaj varma etoso radiante inter la homojn. Tiel multe, ke jam estas tro abunde. La silenta biblia vero jam malaperas en la luminundo de la stelŝutiloj, kandeloj kaj inter la homaj emocioj.Tio jam iras ankaŭ sen Dio.

Ni ne kulpigu aliulojn! Kiu ne havas vivan Kriston – nature solenas Kristnaskon sen Li. Ni atentu pri ni mem: ...”*ne estis loko por ili en la gastejo.”* (Luk.2,7) Ni kristanoj atentu, ke malantaŭ la festa etoso ni ne forgesu pri la biblia realaĵo: en vera malriĉeco aperis la gloro de Dio.

Hodiaŭ en Bet-Leĥem grandega templo staras sur tiu loko, kie onidire naskiĝis Jesuo Kristo. Oro, marmoro, silkaj kurtenoj, pentraĵoj, statuoj. Siatempe la paŝtistoj diris: “*ni jam iru ĝis Bet-Leĥem.”* La Eklezio hodiaŭ ĉiam pli malproksimiĝas de Bet-Leĥem.

Ni ĉiuj timas la malriĉecon – kaj vi kaj mi. Sed jen en la unua prediko de Jesuo estas: ...”*bonanonci al malriĉuloj”*... (Luk.4,18) Kial Jesuo serĉis la malriĉulojn?

Malriĉeco estas stato benebla! Ne temas nun pri tiuj, kiuj vere malsatmortas dise en la mondo pro maljustaj cirkonstancoj. Temas pri vi kaj mi, kiuj estas malkontentaj en niaj modestaj hejmoj. Ne tial vi estas malfeliĉa ĉar vi estas malriĉa! Aŭ vi jam estas tro riĉa, aŭ tiom ensorĉis vin la sopiro por la riĉeco, ke tial vi ne povas esti feliĉa.

La veraj grandaj valoroj de la vivo ne nur ne estas aĉeteblaj per mono, sed preskaŭ ne akordigeblas kun la mono. Amo, paco, ĝojo, frateco, komuneco, boneco, sindono ne estas akireblaj per mono.

Tiom da misuzo okazis per la mono, potenco, forto – kiam Dio volis komenci ion tute novan, nur tiel povis komenci: en stalo.

Permesu, ke Dio komencu ankaŭ en vi ion tute novan! Ĉu vi estas sufiĉe malriĉa por tio?

Iam antaŭlonge oni fierante portis la riĉecon. Nun ribelante ni portas la malriĉecon. En si mem tio vere ne sufiĉas. Por la ekstera malriĉeco ni bezonas ankaŭ la psikon de Maria kaj Jozefo por ke ekbrilu en ĝi la gloro de Dio. ☙

# Ofendo aŭ liberiĝo

Enkonduka teksto en paroĥa gazeto.

Tradukis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Kiam Jesuo revenis al Nazaret, Li laŭkutime iris al la sinagogo por tie celebri la diservon. Kiel infano li tie aŭskultis la solenan recitadon de la Skribaĵo kaj tie Li ankaŭ parkere lernis la unuajn psalmojn. Kun la permeso de la estro li nun alpaŝis por legi, prenis la libron de Jesaja kaj eklegis:

*La spirito de la Eternulo estas sur mi, Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj Kaj vidpovon al blinduloj, Por meti la vunditojn en liberecon, Por proklami favorjaron de la Eternulo.* (Luk 4:18-19)

La teksto, kiun li legis, estis profetaĵo. Lia elekto de teksto certe scivoligis la ĉirkaŭstarantojn. Estis teksto pri la Mesio. Ĉu eble Li iom priparolos la sopiratan tagon kiam Mesio venus? Estis tute silente en la sinagogo. Ĉies okuloj estis turnitaj al Li. Jesuo redonis la libron kaj trankvile diris: *"Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj."*


La Mesio jam alvenis!

Nekomprenebla, senkomparebla, neebla. Kiel eblis ke Li, kiu estis samlandano, ke Li eldiris tiajn vortojn?

Jesuo aplikis la vortojn de la profeto sur sin mem. Li kunportis liberiĝon, saniĝon kaj gracon. Li estis la sanktoleito, Mesio, kiu anoncis la favorjaron de la Eternulo.

Tio ĉi kreis fortan koleron inter la homoj kaj plialtiĝis ĝis malamo kaj linĉemo. Estis ja blasfemo kaj blasfemanton oni devis ŝtonmortigi. Ne eblis ke li estu la Mesio. Oni puŝis lin el la urbo por mortigi Lin. Nun Jesuo montris sian potencon kaj trairis la homamason kaj forlasis ilin.

Tiu ĉi biblia rakonto estas la evangelia teksto la unuan dimanĉon de advento. Advento signifas alveno kaj per advento ni komencas nian eklezian jaron. Ni honoras la Reĝon kiu prezentas favorjaron ankaŭ al nia paroĥo. Li estis forĵetita, nek pro siaj pli fortaj postuloj, nek kiel pentopredikanto, sed kaŭze de la evangelio. Jes, la evangelio enhavas ankaŭ evidentan ofendon: ke finfine ĉio dependas kiel ni akceptas tiun ĉi Jesuon kiu proponas la Regnon de Dio, regno plena de graco, pardono kaj ĝojo.



Karaj gefratoj, en la jaro 1966 nia samideano **Jacques Tuinder**, ĝisosta KELI-ano kaj dumviva membro de IKUE (profesie li estas social-helpisto) por la unua fojo aŭdis pri la giganta problemo de nenecesa blindeco en grandaj partoj de la mondo. Tiutempe oni parolis pri ĉirkaŭ 15 milionoj da blinduloj, el kiuj tri el kvar estas tute nenecese vidhandikapitaj. Ilia blindeco ĉu preventeblas, ĉu kuraceblas. Li konsideris tion grava kulpigo kontraŭ nia tiel nomata civilizita sed tiukampe blindega mondo.

# Ĉu Esperantistoj Esperigas Esperantojn?

Prelego verkita de Jacques TUINDER, NL, por la Ekumena Kongreso 2007 en Pelplin,

prezentita de Siegfried KRÜGER, DE

Jacques konatiĝis kun Fondaĵo portanta la nomon de fama oftalmologo, prof. d-ro H.J.M. Weve; dum multaj jaroj li estis ne senmerita ĝia estrarano. Tiu fondaĵo iniciatis projektojn en orient-afrikaj landoj. Prezentiĝis la eblo finance 'adopti' i.a. kataraktulojn per sponsorado de simbola pago de du aŭ tri nederlandaj guldenoj.

Jacques kaj lia edzino Vera – ili ekkonis unu la alian kadre de la Universala Kongreso de Esperanto, en 1959 okazinta en Varsovio (Pollando) – decidis partopreni tiun agadon, ĉar ĝi ebligis redoni lumon al multe da homoj, esperantaj ekvidi aŭ pli akre vidi. Unualoke la atento direktiĝis al Kenjo, kie Jacques havis helporilaton kun la ĵus komenciĝinta blindulejo en Aluor, instituto kun 65 vidhandikapitaj infanoj.

Kiam okulisto en 1965 vizitis tiun lernejon, li konstatis ke supozeble 17 infanoj (= pli ol 20%) estas operacieblaj...

Kiam la okuloj de Jacques vaste malfermiĝis antaŭ **la mondvasta tragedio de evitebla blindeco**, temis – mi jam diris – pri 15 milionoj da blinduloj, sed post 40 jaroj – malgraŭ ĉiuj fortostreĉoj de multegaj organizaĵoj kaj agadgrupoj – la nombro eĉ triobliĝis.

Nune inter kvardek kaj kvindek milionoj da homoj – mankas, komprenble, fidindaj statistikoj – ne vidas la miraklon de la ĉiutaga sunleviĝo, ĉar ili ne havas aliron al okulspecialisto. Kaj mi ne parolas pri la amasegoj da malforte vidantaj homoj kiuj urĝe bezonas okulvitrojn.

Jacques decidis gajni parencojn, geamikojn, najbarojn kaj kolegojn ktp por la ideo pagi almenaŭ unu okuloperacion. Kaj multaj spontane reagis kaj konsentis. Poste li, pripensante la aferon, venis al la konkludo, ke estus bonega penso direkti sin al la esperantistaro, ĉar 'nia

diligenta kolegaro' parolas kaj propagandas lingvon, kiun donacis al ni okulisto. Kaj tiu okulisto estis ne nur aŭtoro de internacia komunikilo, kiun ni ĉiutage uzas, sed li ligis kun sia lingvo idealon kaj ideon. Ĉiu esperantisto profunde konscias pri tio, ke por d-ro Zamenhof tiu 'interna ideo' estis ege esenca. Kaj iom post iom Jacques kreskis al la decido turni sin al siaj samideanoj. Tio okazis en novembro 1966, kiam li alvokis la legantojn de *Espero Katolika* 'esperigi esperantojn'.

La demando estis: ĉu eblas – laŭ la spirito de d-ro Zamenhof – tre konkrete eksterigi la internan ideon de Esperanto? Kaj tiel naskiĝis la nomo de agado, kiu ekzistis dudek kvin jarojn, t.e. *Agado E3: "Esperantistoj Esperigas Esperantojn"*. La tiama espero de Jacques estis, ke 'Uzantoj de Lingvo de Espero' – kaj nelaste tiuj, kiuj aŭdas en la oreloj la vortojn de Jesuo ('Mi estis blinda kaj vi redonis al Mi vidpovon') – certe kaj amase donos esperon al tiuj el ni kiuj esperas vidi lumon. Ĉiam li esperis, ke per ĉi tiu agado li servos samtempe kaj al la sorto de vidhandikapuloj kaj al la disvastigo de nia kara lingvo.

En 1968 okazis la unua komuna kongreso de IKUE kaj KELI. Eble kelkaj el vi memoras, ke la ĉeestintaro tiam akceptis – laŭ iniciato de Stefan Maul – rezolucion, kiu

> *"konstatis, ke Agado E 3 meritas subtenon de ĉiu esperantisto, kiu laŭ ekzemplo kaj spirito de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof, volas mildigi la suferojn de blindaj homoj; deklaris tial Agadon E 3 afero de la tuta esperantistaro (...); esperis, ke konkreta kunlaboro inter IKUE kaj KELI kondukos ankaŭ al aliaj formoj de frata kunlaboro kaj komuna agado laŭ la spirito de la kristanismo".*

Ĝis la hodiaŭa tago ĉi tiu rezolucio, bedaŭrinde, restis ne multe pli ol papera, senefika afero...

> La demando estis: ĉu eblas – laŭ la spirito de d-ro Zamenhof – tre konkrete eksterigi la internan ideon de Esperanto?

Tiel Jacques staris antaŭ duobla tasko: unue malfermi okulojn de la esperantistaro por ke malfermiĝu okuloj de malproksimaj homoj, foraj ankaŭ de okulspecialistoj. Li ekde la komenco tute ne havis la intencon fondi organizaĵon. Li deziris esti kaj resti privata persono, unuopulo kun multe da kromaj manoj kaj piedoj. Li volis fari ĉiun laboron je propra poŝo kaj en siaj liberaj horoj. Kaj tio restis la formulo ĝisnuna: ĉiuj subvencioj kaj mondonacoj centprocente fluas al la bonaj celoj, dum la ne-projektligitaj kostoj estas la zorgo de la iniciatinto.

Ĉiujare du personoj, prefere el rondoj de grandaj sponsoroj (Sovaĝaj Anseroj, Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, komunumo Heemskerk, ekleziaj komunumoj, monaĥejoj, revendejoj, servokluboj, k.s.) kontrolas la librojn de la fondaĵo. Se iu postulas revizoran raporton, li aŭ ŝi pretu pagi la kostojn.

Ade kaj ade montriĝis, ke la nomo de la Internacia Agadgrupo ne adekvatas,

ne taŭgas, ĉar la plej granda parto de la esperigantoj jes havas malfermitajn okulojn sed ne parolas Esperanton. Lasinte periodon dudek kvinjaran malantaŭ si, Jacques duonigis la duoblan taskon – unuflanke malfermi esperantistajn vidantajn okulojn kaj aliflanke nenecese vidhandikapitajn okulojn – ĉar tiu laborego estis superhome peza. Li perdis tro da tempo, energio kaj mono, kiujn li prefere utiligu por la dua kategorio, kiun li deziris helpi. Post dudek kvinjara agado li ŝanĝis la nomon de la Agado en **'Aktie zi-e-nd-e-rog-e-n'** (internacilingve: "E-vid-E-nt-E")**.** En 1997 la Agadgrupo fariĝis jura persono (fondaĵo) kun oficiala registrigo en Ĉambro de Komerco. Sekretario fariĝis Cor Dekker (konstru-specialisto) kaj kasisto Daan Simoons, impostsciencisto. En 1991 Jacques turnis sin al la esperantistaro por serĉi personon, kiu transprenu lian unuan taskon, t.e. disheroldi la mesaĝon ke tri el kvar blinduloj povus vidi, se... 'Evidente' komencis agadi sub la kerneca latinaĵo *"Videantur ut videant"*. Tio signifas: Ke ni – esperantistoj kaj neesperantistoj – ekvidu blindan kunhomon en fora lando, por ke li aŭ ŝi vidu: foje denove, foje pli akre! Bedaŭrinde ĝis nun tiu krianta heroldo en nia verdstela dezerto ne anoncis sin. Jacques restis la ĉefa kaj plene responsa motoro de la afero, iniciatanta, informanta, monpetanta, dankanta, plenumanta, vojaĝanta.

> Kaj tio restis la formulo ĝisnuna: ĉiuj subvencioj kaj mondonacoj centprocente fluas al la bonaj celoj, dum la neprojektligitaj kostoj estas la zorgo de la iniciatinto.

Bela, kortuŝa periodo estis la tempo de la 'mola valuto', la tagoj de la komunismo. Multaj homoj en mez- kaj orient-eŭropaj landoj emis tiam subteni la porblindulajn projektojn, sed ne povis sendi monon. La sekvo estis, ke ĉiutage – kvazaŭ bombarde – invadis la hejmon de familio Tuinder pakaĵoj enhavantaj folklore vestitajn pupojn, gramofondiskojn, librojn, skulptaĵojn, k.s. Tio estis laciga, multan energion formanĝanta, temporaba laboro: en variaj lokoj kaj ĉe diversaj okazoj li devis peti al la nederlanda publiko: "*Sinjorino/ sinjoro, ĉu vi pretas ebligi al oferema homo en nepagipova lando, al Polo aŭ Ĉeĥo aŭ Hungaro, iom kontribui al la batalo kontraŭ la nenecesa blindeco?"*

Preskaŭ ĉiam li devis paciencelokvente ekspliki, kio povus esti la mistera, magia rilato inter pupoj kaj blinduloj... Kiam falis muroj kaj malaperis kurtenoj, tiu karakteriza helpado komplete finiĝis, tiu fonto de enspezoj tute sekiĝis. Restis nur unu aŭ du fidelaj kontaktoj.

En la daŭro de la tempo 'Evidente' fariĝis vasta, konstante kreskanta grupo da okulistoj, optikistoj, fakinstruistoj, rekapabligo-specialistoj, brajlopresistoj, arkitektoj ktp. Ĉiuj estas volontuloj; neniu ricevas salajron. 99% el la sponsoroj loĝas en Nederlando kaj escepte de kelkaj esceptoj ĉiuj parolas Lingvon de Esperanto, kvankam ne la Zamenhofan. Por eviti miskomprenojn: dum pli ol

kvardek jaroj Jacques neniam malpermesis al esperantistoj kontribui brike aŭ mem iniciati kampanjon aŭdace kaj entuziasme. La ideo estas tiel simpla, sed ne trovas idealistojn: serĉi okuliston aŭ optikiston kaj vojaĝi al lando kie amase abundas 'esperantoj'. Kompreneble 'Evidente' volonte disponigas la necesan instrumentaron.

Rilate al la preskaŭ senlima kampo de projektoj mi raportu la jenon:

**Ĝis nun 'Evidente' havis / havas projektojn en 23 landoj**. Ofte Esperanto ludas rolon en tiu senco, ke ĝi malfermis la pordon al laborloko.

Preskaŭ ĉiam esperantisto estas kontaktpersono faranta programon, gvidanta al instancoj kaj interpretanta kiel ponto inter lingvoj ne alimaniere eblas.

Kiam en iu lando Jacques havas renkontiĝon kun esperantistoj, li kutime diras:

> "sen Esperanto mi ne estus ĉi tie!"
> "mi klopodas fari ĉi tiun taskon laŭ la spirito de lingvisto-okulisto Zamenhof kaj instruisto-kuracisto Jesuo!"

Preskaŭ ĉiam esperantisto estas kontaktpersono faranta programon, gvidanta al instancoj kaj interpretanta kiel ponto inter lingvoj ne alimaniere eblas.

La unuaj projektoj de la kampanjo estis: kolekti monon por sendi surradajn okulklinikojn al Kenjo kaj Malavio. Cetere, en Kenjo Agado E 3 konstruis simplan dometon por oftalmologia flegistino.

Sekvis en Kamerunio la konstruado de kvardek-lita okulkliniko kun propra operacia ĉambro por la okulisto. Temis pri okulisto, sendita flanke de la Reformita Eklezio. Li laboris ok jarojn en tiu lando.

Poste komenciĝis forta apogo al Optikejo New Look en Ganao, kiun gvidis kaj ankoraŭ fone akompanas la nederlanda misiisto Zef Cramers. La fondaĵo ĉefe helpis per instruado, per ilaro, montumoj kaj vitroj.

Al Jacques plaĉis subteni ĝuste tiujn personojn en foraj landoj, kiuj devas fari la laboron per malplenaj manoj aŭ nesufiĉo da kono. Grava celo de 'Evidente' estas: instrumentumi ilin scie kaj ile. Tiel 'Evidente' servis al du okulistoj en Hindio kaj unu okulisto en Suda Afriko per oftalmologiaj instrumentoj.

En la daŭro de la jaroj 'Evidente' invitis pacientojn el Pollando, Albanio kaj Bulgario por okuloperacio en okcidenta Eŭropo.

Mi menciu – laŭ alfabeta ordo – kelke da aliaj landoj, kie okazis kaj okazas multe da aktivecoj:

**A l b a n i o**. Kun tiu lando Jacques konatiĝis sekve de letero de esperantisto; poste Sali Berisha honorige titolis lin 'instruisto de la popolo' kaj UEA nomumis lin honora membro. Al lia edzino 'Evidente' helpis per komplika katarakt-operacio.

Kun profesoro pri oftalmologio Jacques vizitis ĉiujn albanajn okulistojn, kio rezultigis sponsoradon de instrumentoj kaj starigon de Optikejoj en

Durres kaj Gramsh. Bedaŭrinde la Piramidaj Ludoj (1997) kaŭzis grandan kaoson kaj veran anarkion en la lando, dum kiu periodo malaperis multe da materialoj kaj finiĝis la farado de okulvitroj en du lokoj.

Nur antaŭ du jaroj 'Evidente' startis trian optikejon en Barbullush sub respondeco de nederlanda familio, kies parencoj jam de la liberigo projektumas en Albanio.

Ekde 1995 Evidente helpis al la Blindulejo en Tirano sur multaj terenoj (hejtado, izoligado, muziksalono, muzikiloj, brajlopresejo, lerniloj, renovigo de la internulejo, ktp). Kaj ĉi ĉio movis la prezidanton de Albanio danke kaj estime distingi la fondaĵon per ora medalo kaj oficiala dokumento (junio 2006).

La estraro de la blindulejo freŝdate petis al 'Evidente' pliampleksigi la instituton per ses klasĉambroj por ebligi postelementan aŭ duagradan instruadon. Temas pri projekto de ĉirkaŭ 140.000 eŭroj.

**Bulgario**. Dufoje Jacques vojaĝis kun blinda esperantisto al tiu lando por helpi al pluroble handikapitaj blinduloj per komputilo. 'Evidente' donacis brajlopresejon al la Asocio de Nevidantoj en Sofio kaj funde rekonstruis la Rekapabligan Centron en Plovdiv. En tiu urbo ĝi subtenis ankaŭ laborprojektojn.

En 2002 la fondaĵon distingis la Asocio de Nevidantoj en Bulgario. En junio de ĉi tiu jaro Jacques laboris kun optikisto kaj instruspecialisto en Varna, nelaste en prizonoj, inter ciganoj sur rubodeponejo kaj favore al surstrate kaj senŝance vivantaj infanoj. La blindulejo en Varna petas materian helpon en la formo de lerniloj, brajloprintiloj kaj televidaj lupeoj.

Ĉijare Vera kaj Jacques decidis ne kongresi kaj per la ŝparita mono kun aldonaj donacoj de aliaj sponsori 12 blindulojn, kiuj tiel povos partopreni la Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Bulgario. Tial mi (Siegfried) parolas en la nomo de la forestanto.

Ĉijare Vera kaj Jacques decidis ne kongresi kaj per la ŝparita mono kun aldonaj donacoj de aliaj sponsori 12 blindulojn, kiuj tiel povos partopreni la Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Bulgario

**Kosovo**. Kiam la inter-etnaj bataloj finiĝis 'Evidente' donacis al la Asocio de Blinduloj kompletan brajlopresejon.

**Maroko**. En tiu lando 'Evidente' helpis al okulisto per operacia mikroskopo. Krome ĝi 'adoptis' du denaske blindajn infanojn por ke ili frekventu blindulejon, finance ebliginte al kvininfana familio, kies patro estas grave handikapita kaj senlabora, transloĝiĝi al urbo, kie troviĝas tia instituto.

**Moldavio**. Dufoje Jacques kun okul-specialistoj misiis en Moldavio. Invitis lin esperantistino. Lia fondaĵo helpis per nova hejtilo al la Oficejo de la Asocio de Blinduloj kaj per brajlopresejo. Cetere 'Evidente' kontribuis al la riparado de etaĝodomo por vidhandi-

kapuloj en la ĉefurbo Kiŝinevo. Al amaso da homoj eblis havigi laŭreceptajn okulvitrojn.

**Rumanio**. Sen Esperanto Jacques verŝajne ne estus en tiu lando. Sekve al invito de Sigmond Julia li trifoje laboris en Transilvanio, kie optikistoj helpis al prizonuloj, ciganoj, malforte vidantaj kaj surdaj infanoj, membroj de la Asocio por Nevidantoj, k.s. Laste tio okazis en marto pasinta. Teamo de kvar optikistoj en aprilo pasinta laboris en Constanta – en kiu urbo Jacques estis en marto 2006 – laŭ invito de Porinfana Helpinstanco. Ili mezuris la okulojn de minimume sescent infanoj, parte handikapitaj, parte vivantaj en zorgigaj cirkonstancoj.

Ĉu ne estus bona ideo senrezolucie esprimi la esperon kaj la fortan volon, ke *"konkreta kunlaboro inter IKUE kaj KELI konduku al formoj de frata kunlaboro kaj komuna agado laŭ la spirito de la kristanismo."*

**Srilanko**. Tiun landon Jacques plurfoje vizitis kun okul- kaj konstruspecialistoj. Li laboris en ĉefurbaj kvartalaĉoj, en hejmoj por eksaj infan-soldatoj, kaj en multe da aliaj lokoj por helpi homojn per almezuritaj okulvitroj. 'Evidente' konstruis blindulejon en Batticaloa kaj pliampleksigis hejmon por blindaj infanoj en la Jaffna regiono (kie la Tamilaj Tigroj havas sian bazon).

**Taĝikio**. Danke al Esperanto 'Evidente' jam longe havas kontakton kun tiu lando. Peranta persono estas la blinda Natalia Kasymova, kiu dufoje akompanis teamon de optikistoj dum iliaj misioj. Antaŭ kelke da semajnoj du optikistoj kun grandaj spertoj estis en tiu ekssoveta lando por starigi optikejon sub la tegmento de la okulkliniko kaj priparoli planojn por konstruado de apartamentaro por 21 blinduloj en la suda parto de la lando, pleje trafita de interetnaj bataloj. Temas pri projektoj de ĉirkaŭ 25.000 resp. 300.000 eŭroj.

**Ukrainio**. Laŭ invito de blinda tie loĝanta esperantistino eta teamo de 'Evidente' sukcese kaj fruktodone laboris en la suda parto de Ukrainio, la Krimeo.

**Porokaza helpo**. Preskaŭ ĉiusemajne atingadas 'Evidente' porokulvitraj receptoj. Jacques mendas la lensojn kaj pretigas la okulvitrojn por poste sendi ilin, kelkfoje al esperantistoj, loĝantaj en landoj kun malforta ekonomio.

En la daŭro de la jaroj Jacques ricevis multe da leteroj, en kiuj oni skribas ke li estas nobla homo kaj faras laŭdindan laboron. Li ege esperas ke tiu papera torento finfine finiĝos kaj fariĝos forta fluego da konkreta helpo. *Bedaŭrinde nederlandaj bankoj obstine rifuzas akcepti tiajn skribaĵojn kiel laŭleĝan pagilon...*

Karaj gefratoj, denove ni komune kongresas. Ĉu ne estus bona ideo senrezolucie esprimi la esperon kaj la fortan volon, ke *"konkreta kunlaboro inter IKUE kaj KELI konduku al formoj de frata kunlaboro kaj komuna agado laŭ la spirito de la kristanismo."*

Espero kostas nenion, ne atakas nian

monujon, ne devigas, ne lacigas. Nu, nin pelis al Pelplin Lingvo de Espero kaj Mesaĝo de Espero. Ĉu ne estus pensiga intenco lasi vortojn kaj paroligi farojn?

*“Mi estis malsana, mallibera, sen-tegmenta, soleca, blinda, kaj tiel plu kaj vi... vidis Min, rekonis Min, akceptis Min, adoptis Min”,* diras Jesuo. En siaj kaj... en niaj tagoj! ☙

---

Jacques tre kore dankas al tiuj inter vi, kiuj de tempo al tempo, pli malpli ofte, pli malpli modeste, liajn aktivaĵojn finance aŭ alimaniere kunebligis. Dio mal-avare rekompencu.

Apud la laboro eksterlanda Jacques faras libervolan (honorofican) laboron en du lokoj, kie oni tre forte sponsoras sian laboron, t.e. benediktana abatejo kaj bonfara revendejo (wellfare second-handshop).

Tre kore Jacques salutas la kongreson ankaŭ en la nomo de la edzino Vera

# Kristo – elstara pedagogo!

Siv Burell, SE

Mi estas laiko kaj nova leganto de Dia Regno. Kun granda intereso mi legis ”La aŭtoritato en Protestantaj Eklezioj” kaj la sekvantajn artikolojn pri la sama temo en la numero 5 -2007. Kaj en katolikaj kaj en protestantaj eklezioj ŝajnas ke kernproblemo estas: kiu rajtas interpreti la Sanktan Skribon?

Mi ŝatas la tekston sur paĝo 81: Ĉiu kredanto mem havas aliron al la Sankta Teksto. Ĉiu havas la rajton legi kaj in-terpreti por si mem la Vorton, kaj ricevi por sia propra vivo, kaj por proklami la savon...

Kiam Jesuo predikis al siaj samtem-puloj li uzis jam konatajn tekstojn el la Malnova Testamento kaj aplikis ilin al la ĉiutaga vivo ofte per similaĵoj. Oni povas rimarki ke li donis iomete mal-samajn mesaĝojn al needukita kaj al edukita homoj. Al tiuj kiuj timis la eter-najn punojn, li donis konsolon: Vi estos savitaj pro la graco de Dio. Kredu min!

Tio sufiĉis por tiuj kiuj timis la juĝantan Dion de Abrahamo, Isako kaj Jakobo.

Jesuo ne donas multajn detalojn pri la eterna vivo. Li direktas la taskon al la Sankta Spirito. Eĉ ne la 12 disĉiploj kapablis kompreni la tutan mesaĝon de Jesuo en siaj tiamaj evoluniveloj. Do, Jesuo, kiel elstara instruisto, adaptis la mesaĝon al ilia tiama mensa nivelo

Sed Nikodemo, erudicia fariseo, kiu venis al Jesuo nokte, ne volis konsolon sed la intelektan parton de la vivmistero. Li ricevis apartan respondon: *"Sen esti renaskita, oni ne povas eniri la ĉielan regnon"*. Nikodemo konfuziĝis. Jesuo komprenis ke estis tro frue klarigi tion al Nikodemo. Li nur donis metaforon: Vi sentas la venton sed vi ne scias de kie ĝi venas aŭ kien ĝi blovas.

Ankoraŭ 20 jarcentojn poste oni ne povas paroli malferme pri reenkarniĝo, sen esti rigardata mense malsana. Bedaŭrinde!

Pri Johano la Baptisto Jesuo diras: "Se vi volas kredi tion: li estas Elio, kiu venus".

Sur paĝo 81 (Dia Regno) mi legas: "La kompreno de la Biblio ne fiksiĝis, ĉar la homaj kulturoj ŝanĝiĝas, la valoroj evoluas, la kuntekstoj varias." Saĝaj vortoj!!


Eble la Sankta Spirito jam de longe gvidis nin. Eble venis lumstrioj el la Dia Regno jam. Jesuo diris ke oni ne povas eniri la Ĉielan Regnon sen esti vestita en nuptovestoj.

Certe oni devas "purigi" sian animon en vivo post vivo. Ke neniu perdiĝos povas esti la graco de Dio. La infero nur ekzistas sur la tero. Eĉ kruelaj diktatoroj finfine atingos la ĉielon post sufero en multaj vivoj. Tio ne estas puno de Dio sed efiko de iliaj – kaj niaj - eraroj. La leĝo de la vivo estas: Amu vian najbaron. Malobeo al tiu leĝo kaŭzas suferon.

Studanto ne povas doktoriĝi sen trapasi multajn defiojn kaj obstaklojn. Sed troviĝas ankaŭ libertempoj. Ni certe povas ĝui harmoniajn libertempojn inter la tervivoj por akiri forton por la venontaj "teraj lecionoj".

Evoluo postulas tempon. Kaj tempon ni havas – eternan tempon. Ne estis tempo kiam ni ne ekzistis kaj ne estos tempo kiam ni ne troviĝos laŭ la granda plano de Dio.

Mi rigardas Jesuon kiel la Plej Grandan Pedagogon, kiu saĝe pilotas nin tra la evolusistemo. Sed troviĝas ankaŭ multaj helpinstruistoj, inspiritaj de la Sankta Spirito. La estonteco de la homaro estas luma, eĉ se la nuna tempo ŝajnas malluma. ☙


Doré: Jesuo predikas al la homoj

# Al kiuj sanktuloj oni preĝas en Ruslando kaj kial?

(konsiloj de pravoslava Eklezio por kristanoj)

Larisa KUZMENKO, RU

Sanktuloj protektas kredantojn sur la tero, akvo kaj en kosmo.

- Guberniestroj, politikistoj, estroj preĝu al arĥianĝelo Miĥaelo. Lia memortago estas la 21-a de novembro).

La arĥianĝelo forpelis satanon kaj diablojn el paradizo. Estas li, kiu gvidis batalon kontraŭ malbono. Tial sur la ikonoj Miĥaelo estas pentrita kun la ŝildo kaj fajra glavo. De li dependas kiu estos estro kaj pri kiu nomo en historio oni povas forgesi. La arĥianĝelo strikte punas maljustecon, koruptecon kaj li ne aprobas aspiron de regado por kontentigi fierecon.

- Juĝistoj, juristoj kaj ŝtatestroj preĝu al la plej saĝa reĝo Salomono (oni festas lian tagon la unuan dimanĉon post la oka de januaro).

Dio aperis en nokta vizio al la juna reĝo kaj promesis al li plenumi iun peton. Salomono petis saĝecon por regi prudente. Dio donacis saĝon al la reĝo kaj tiun saĝon neniu homo havis. Dio donis al la reĝo ankaŭ riĉecon kaj gloron. Salomono regis dum kvardek jaroj kaj li proklamis tri mil plej saĝajn sentencojn, skribis tri librojn kiuj eniris la Malnovan Testamenton. Li konstruis Jerusaleman templon. Do, por decidi ion la homoj devas turni sin al Salomono kun preĝo.

- Kuracistoj kaj iliaj pacientoj devas preĝi al la granda martiro kaj kuracisto Pantelejmono. Lia memortago estas la 9-a de aŭgusto.

La juna Pantelejmono studis kuracarton, kaŝe baptiĝis kaj senpage kuracis per preĝo.La aliaj kuracistoj, vidinte tion, raportis al la imperiestro de Romo pri tio, ke li estas kristano. La sanktulo estis terure punita per fajro kaj varmigo, tamen el ĉiuj provoj li eliris sendifekta. Kiam Dio vokis lin al Si, Pantelejmono, kiun la imperiestro Maksimiliano kondamnis je morto per glavo, mem petis la ekzekutistojn forhaki al li la kapon. Ĉi tiu kapo kiel granda sanktaĵo estas en la rusa monaĥejo je la nomo de kuracisto Pantelejmono en la greka duoninsulo Afono.

- Lernantoj, studentoj, instruistoj preĝu al la deculo Sergio Radoneĵskij. Lia memortago estas la 8-a de oktobro.

Li estas multe honorigita sanktulo, la fondinto kaj la unua prioro de la Sankta –Triunua Lavra en la urbo Sergiev-Posado, kiu estas la centro de Pravoslava klerigado en Rusio. Kiam li estis infano Sergio havis malfacilaĵojn en lernado. Unufoje anĝelo, kiu aspektis kiel maljuna monaĥo, aperis antaŭ li kaj donis al la knabo hostion. Kiam Sergio manĝis ĝin, li ricevis de Dio donacon de intelekto. Nuntempe la lernantoj, kiuj volas

havi sukcesojn en lernado, preĝas al la "prioro de la rusa lando". Sergio estas la granda protektanto de Rusio. Al li oni povas preĝi pri la bonstato de la lando.

La sankta martirino Tatjana. Ŝia memortago estas la 25-a de januaro. Dum la tago estis fondita la Moskva universitato. Ŝi protektas studentojn kaj precipe tiujn, kiuj studas en la Moskva universitato.

La granda martirino Jekaterina. Ŝia memortago estas la 7-a de decembro. Ŝi ankaŭ protektas scienculojn kaj filozofojn. Ŝi kristanigis ĉirkaŭ kvindek paganajn scienculojn.

- Vojaĝantoj, malriĉuloj, maljuste kondamnitaj homoj preĝu al la Sankta Prelato Nikolao Mirlikijskij. Liajn memortagojn oni festas la 22-an de majo kaj la 19-an de decembro.

En Rusio en ĉiuj preĝejoj kaj en loĝejoj apud ikonoj de nia Savanto kaj Dipatrino nepre estas la ikono de la Prelato Nikolao la Servisto. La Miraklisto Nikolao helpas al ĉiuj, kiuj estas en malfeliĉa situacio kaj li helpas ne nur al kristanoj, sed al ĉiuj homoj.

- Pilotoj, aviadistoj, kosmonaŭtoj preĝu al la profeto Elija. Lia memortago estas la 2-a de aŭgusto.

Por prudentigi paganojn Elija petegis Dion kontraŭi pluvon kaj dum tri jaroj kaj duono ne pluvis. Poste Elija denove preĝis kaj denove ekpluvis, Li estas protektanto de la homoj, kiuj vojaĝas per flugmaŝinoj. Oni pretas helpon de la profeto dum seka vetero.

- Militistoj preĝu al la sankta princo Aleksandro la Nevskij kies memortagon oni festas la 6-an de decembro.

Pro sia venko, kiun li faris en 1240 en la batalo kontraŭ malamikoj, Aleksandro estis nomita Nevskij (la rivero Neva estas en S-Peterburgo). En lia grupo estis malmulte da soldatoj, sed ili kredis je Dio kaj Dipatrino, la protektantino de la rusa tero. Aleksandro kutime diradis:"Dio ne en forto estas, sed en justeco." Krom li la protektantoj por la militistoj estas arĥianĝelo Miĥaelo kaj la prelato Nikolao.

- Milicanoj preĝu al la martiro Johano Militisto. Lia memortago estas la 12a de aŭgusto.

La martiro vivis en la IV-a jarcento kaj akuzadis ŝtelistojn. Li forpasis



Ortodoksa preĝejo, bildo el Vikipedio

kiam li estis tre maljuna kaj kiam li estis juna li suferis pro turmentoj. Dum preĝoj li helpas trovi ŝtelitajn aĵojn.

- Kantistoj preĝu al la deculo Romano Sladkopevec (Dolĉkantisto). Lian memortagon oni celebras la 14-an de oktobro.

Li servis kiel sakristiano en la VI-a jarcento en la Konstantinopola katedralo. La servistoj en la preĝejo ridis pri li. Unufoje post turment-plena humiligo Romano ege ploris kaj ekpreĝis fervore antaŭ la ikono de Dipatrino kaj forgesis sin en dormo. Dum la dormo li ekvidis Dipatrinon, kiu ordonis al li engluti pergamenan rulaĵon. Vekiĝinte, Romano trovis, ke li scipovas legi kaj ekhavis belan voĉon. Pro tio la Eklezio nomis lin Dolĉkantanto (la rusa vorto "sladkij" signifas "dolĉa").

- Savantoj, fajrestingistoj, ĉiuj, kiuj riskas per sia vivo, preĝu al la granda martirino Varvara kies memortagon oni celebras la 17an de decembro.

Ŝi naskiĝis en la IV-a jarcento en la urbo Iliopolo (en Turkio). Neniu turmento devigis ŝin apostati kaj rezigni la kredon en la Sola Dio. Antaŭ sia morto Varvara petegis la Sinjoron doni al ŝi apartan forton. La forto estis en tio ke ĉiuj, kiuj preĝos al ŝi, ne mortos se ili ne konfesos siajn pekojn antaŭ Dio. La tuta pravoslava mondo turnas sin al la Sankta Varvara kaj petas ŝin doni al ĉiu kristano "forpason en Kristo".

- Farmistoj preĝu al la pastraj martiroj Harlampio, kies memortago estas la 23-a de februaro, kaj Vlasio, kies memortago estas la 24-a de februaro.

Antaŭ ol morti pro la paganoj, kiuj turmentis ilin, ili preĝis al Dio por ke ĉiuj, kiuj honoros ilin, memoros pri ili, liberiĝos el ĉiuj malfeliĉoj. Krom la kuraca talento ili povas doni riĉan rikolton.

- Komercistoj kaj vendistoj preĝu al la martiro Johano la Nova kies memortagon oni celebras la 15-an de junio.

Pro sia inklino al kristanismo Johano estis elturmentita de paganaj vendistoj. Komence oni batis lin per bastonoj, poste ligis lin al la ĉevala vosto kaj trenadis laŭ la urbaj stratoj kaj fine iu homo forhakis lian kapon.

*Kiel trankviligi, sed ne kolerigi estron?*

Por superforti la koleron de iu estro oni povas preĝi al la sankta profeto Davido. Oni memoras pri li la unuan dimanĉon post Kristnasko.

Se vi havas problemojn kun via estro aŭ ĉefo, aŭ problemojn en familio aŭ socio rilate al viaj geamikoj, preĝu al Dipatrino antaŭ la ikono "Semistreljnaja" (tiu vorto signifas "havanta sep sagojn") aŭ la ikono "Plimoligo de koleraj koroj".

Se vi aliras al la pordo de via estro aŭ parolas kun via estro ripetu en penso la preĝon: *"Sinjoro mia, rememoru la reĝon Davidon kaj la tutan mildecon lian"*. ☙

# Forto el patrina amo

Mu Binghua, Ĉinio

Antaŭ nelonge, pro grava vundiĝo mia fratino envenis hospitalon. Mi portempe akompanis ŝin por eventuala helpo. En la sama ĉambro troviĝis ankaŭ alia knabino, kiu pro trafika akcidento estis urĝe kuracata. Ŝi ĉiam restis en svena stato.

En la sveno la knabino kelkfoje mallaŭte kriis: "Panjo, panjo!" Apud la malsan-lito ŝia patro estis tre konfuzita, kaj li kun malgaja mieno rigardis sian filinon dolore barakti. Li tute ne sciis kiel helpi ŝin kaj nur povis senĉese plorpeti la kuraciston: "Savu ŝin, savu mian filinon!"

Li ne sciis, ke la kuracisto jam uzis plurajn medikamentojn efikajn por ŝi. Li ankaŭ ne sciis, ke svenanto iam bezonas ankaŭ iel savi sin. Tiu knabino povas aŭ ne povas daŭrigi sian vivon, kio ja dependas de ŝia sopiro al la vivo.

Iu juna flegistino konsultis la viron: "Kie estas la patrino de la knabino? Kial vi ne venigis ŝin tien ĉi?" La viro duonvoĉe respondis: "Ni eksgeedziĝis jam delonge. Kaj nun mi neniel trovas ŝin."

Iom sulkiginte la brovojn, silente sidiĝinte, la flegistino, atenteme subpremante la knabinan glacian manon, milde konsolis: "Mia bona filino, mi estas via panjo, jen via panjo..."

La viro levis la kapon kaj surpriziĝis. Sed tuj poste kun larmoj en la okuloj li diris al la flegistino: "Dankon, dankon".

Ĉiufoje, kiam la svenanta knabino diris la vorton "panjo, panjo...", la juna flegistino tuj afable respondis per "mia bona filino". La flegistino estis preskaŭ same aĝa kiel la knabino, vokanta sian patrinon kaj ankoraŭ estis fraŭlino.

La knabino, kvazaŭ dronanto, forte kaptis la flegistinon je la mano kaj ŝi komencis havi malrapidan, sed egalritman spiradon.

En la sekvaj tagoj, la flegistino, kiel ŝia vera panjo, ĉiam estis ĉe ŝi kaj neniam forlasis ŝin. Sidante antaŭ la malsan-lito de la knabino la flegistino, subpremante ŝian manon, diris ion al ŝi, parolis pri interesaj rakontoj, kantis mallaŭte...

Tiel estis. Ĝis la knabino tute vekiĝis el la sveno. Kun granda miro la kuracisto diris: "Ŝi povas eĉ akiri konscion kaj tio vere estas miraklo malofte okazanta."

La resaniĝinta knabino rakontis: "En mia sveniĝo mi sentis, ke mia panjo, per paro da varmaj manoj, ĉiam tiras min for kaj finfine eltrenis min el la fundo de puto glacia kaj malluma ĝis ties supro..."

Oni fiksis admiran rigardon sur la flegistino plena de ama sento, tiel ke ŝi iom ruĝiĝis kaj tre modeste diris: "Mi tre bone memoras unu faman frazon, nome – *Estas patrina amo, kiu kapablas ĉion savi.*"

Jes. Ni apenaŭ venis al tiu ĉi mondo, ni senescepte estis tre malfortaj kaj tre malfortikaj. Sed sub prizorgo, amo kaj trenado fare de nia patrino ni tagon post tago kreskis kaj kreskas. La forto el patrina amo ja formis nian propran forton! Ĉu ne?!

Mi propraokule vidis la agon de la bonkora flegistino-fraŭlino. Dum mi admiris la patrinan amon, mi des pli respektas la kuraĝon de la flegistino, ĉar ŝi senhezite foroferis sian amon al alia homo, kiun ŝi eĉ ne konis. ☙

# La tempo flugas...
## estas jam decembro

Elmer ESCOTO,
HONDURAS

Denove la homoj haste prepariĝas por adiaŭi al malnova jaro kaj ricevi la novan. La homamaso kuras el kaj al…

Ĉiuj volas aĉeti vestaĵojn, manĝon kaj ĉiaspecajn varojn por donaci. La tag-gazetoj multobligis siajn paĝojn kaj ĵurnalo kiu kutime enhavas 70 paĝojn da noticoj nun estas 160-paĝa ĵurnalo, ĉefe pri anoncoj por la vendejoj; ĉiuj volas aĉeti beletan arbon, lumetojn, ornamojn, ĉar la jarfino alproksimiĝas. Decembro estas tempo por memori kaj por antaŭplani, por forgesi kaj por esperi, por doni kaj por ricevi. Decembro estas la lasta monato, la lasta spiro de baldaŭ mortonta jaro. Kvankam multaj renkontiĝas, kelkaj ne. Multaj restas tute solaj, tristaj, meditantaj... Sed por ĉiuj estas sendube periodo pri adiaŭo. Kaj periodo pri zorgo pri la estonteco.

Tiel mi kare memoras la lastajn du ĉapitrojn de Josuo (ĉap. 23 kaj 24). Josuo, jam preta morti, alparolas la popolon.

En Eliro 33:11 ni spektis junan Josuon. Ĉi tie en Josuo 23 ni havas maljunan Josuon, kiu kunvenigis la tutan popolon por paroli al ili siajn lastajn vortojn.

En Agoj, ĉapitro 7 ni havas junan Saŭlon kiu fariĝis la maljuna Paŭlo de Filemon 1:9.

Estas ĉiam grave, ke ni aŭskultu la lastajn vortojn de servanto de Dio.

Kion vi dirus al viaj gefiloj antaŭ ol vi mortus? Kompreneble nur bonajn konsilojn kaj profundajn verojn. Same okazas en la Biblio. Ni prenu ekzemple la vortojn. de Jakob:

*Gen 48:1*

> *Post tiuj okazintaĵoj oni sciigis al Jozef: Jen, via patro estas malsana. Kaj li prenis kun si siajn du filojn, Manase kaj Efraim.*

*Gen 48:21*

> *Kaj Izrael diris al Jozef: Jen mi mortas; kaj Dio estos kun vi kaj revenigos vin en la landon de viaj patroj.*

kaj tiujn de Jozef:

*Gen 50:24*

> *Kaj Jozef diris al siaj fratoj: Mi mortas, sed Dio rememoros vin, kaj elkondukos vin el ĉi tiu lando en la landon, pri kiu Li ĵuris al Abraham, Isaak, kaj Jakob.*

kaj de Moseo –
la tuta libro de Readmono estas la lasta parolado de Moseo al la Izraela popolo.

Kaj de Elija al Eliŝa. Kaj multajn aliajn ekzemplojn ni povus preni. En la Biblio, estas do inde kaj ende aŭskulti la lastajn vortojn de servantoj de Dio. Kaj tiuj lastaj vortoj ĉiam same diras – Ne rigardu al homoj? Ne!

Rigardu al la Fidela Sinjoro!

Rigardu al La Sinjoro kiu estis fidela en via pasinteco (via hieraŭo)!
Rigardu al La Sinjoro kiu estas fidela en via estanteco (via hodiaŭo)!
Kaj rigardu al La Sinjoro kiu estos fidela en via estonteco (via morgaŭo)!

Josuo parolas al la popolo dirante, ke li jam pretas morti, sed ke ili ne forgesu pri Dio. Josuo estis sklavo en Egiptujo. Li spektis la plagojn. Li manĝis la Paskon kun la popolo. Li eliris Egiptujon kun la popolo. Li vidis la Ruĝan Maron disfendiĝi. Li vidis la egiptojn droni kun siaj ĉevaloj kaj ĉaroj. Li vidis la nuban kolonon, kaj la fajran kolonon. Li trinkis la akvon de Mara. Li manĝis manaon kun la popolo. Li transiris la Jordanon. Li donis bonajn novaĵojn pri la lando Kanaana. Li batalis, luktis kaj konkeris la amalekidojn, amoridojn. Li venigis la popolon en la Promesitan Landon.

Kaj nun li parolas al tiu sama popolo. Kion li diras al ili (kaj certe, al ni)?

En la 16 versikloj de tiu ĉi ĉapitro, Josuo mencias la Eternulon 16 fojojn. Tio klare indikas al ni, kion Josuo celas diri: *"ne forgesu Dion, nek Liajn farojn, ĉar Li estis fidela, kaj Li mem batalis por vi".*

Ni ne rigardu al homoj – sed al Dio!

Rigardu la Sinjoron, kiu estis fidela
Rigardu la Sinjoron, kiu estas fidela
Rigardu la Sinjoron, kiu estos fidela

*Isa 45:22*

*Turnu vin al Mi, ĉiuj finoj de la tero, kaj estu savitaj; ĉar Mi estas Dio, kaj ne ekzistas alia.*

Dio estas memekzistanta.
Dio estas neŝanĝebla.
Dio savas.
Dio estas Sinjoro.
Dio donas ripozon al Sia popolo. Ne nur la ripozon de Kanaan, sed la ripozon de Lia savo.

En tiu ĉapitro 23 de Josuo Ni rimarku la jenon:

### La fideleco de Dio en la pasinteco

- Dio faris interligon kun Abram (Gen 15)
- Kun Jakob (Gen 48:1-2, 21,22)
- Dio liberigis Izraelon; Li gvidis ilin; Li protektis ilin; Li manĝigis ilin… Li donis al ili ripozon

*Jos 21:44*

*Kaj la Eternulo donis al ili trankvilecon ĉirkaŭe, konforme al ĉio, kion Li ĵuris al iliaj patroj; kaj neniu homo el ĉiuj iliaj malamikoj rezistis antaŭ ili; ĉiujn iliajn*

*malamikojn la Eternulo transdonis en iliajn manojn.*

Ni memoru pri Lia fideleco en la pasinteco. Kaj en la estanteco, ni fidu al Li.

*Jos 23:3*

*Kaj vi vidis ĉion, kion faris la Eternulo, via Dio, al ĉiuj tiuj popoloj antaŭ vi; ĉar la Eternulo, <u>via Dio, mem batalis por vi.</u>*

*Jos 5:13-14*

*Kaj okazis, ke kiam Josuo estis apud Jeriĥo, li levis siajn okulojn, kaj ekvidis, ke jen viro staras antaŭ li kaj en sia mano li tenas nudigitan glavon. Kaj Josuo aliris al li, kaj diris al li: Ĉu vi estas nia, aŭ ĉu el niaj malamikoj? (14) Kaj tiu diris: Ne, mi estas <u>militestro</u> de la Eternulo, mi nun venis. Tiam Josuo ĵetis sin vizaĝaltere kaj faris adoron, kaj diris al li: Kion mia sinjoro diros al sia sklavo?*

> Memoru pri la grandaj faroj de Dio. Li faris grandaĵojn por ni. Li savis nin. Li pardonis niajn pekojn. Li pravigis nin.

*Jos 10:11*

*Kaj kiam ili, forkurante de la Izraelidoj, estis sur la deklivo de Bet- Ĥoron, la Eternulo ĵetadis sur ilin grandajn ŝtonojn el la ĉielo, ĝis Azeka, kaj ili mortis; pli granda estis la nombro de tiuj, kiuj mortis de la ŝtonoj de hajlo, ol la nombro de tiuj, kiujn la Izraelidoj mortigis per la glavo.*

*Jos 23:9*

*Kaj la Eternulo forpelis de antaŭ vi popolojn grandajn kaj fortajn; kaj neniu rezistis antaŭ vi ĝis la nuna tago.* Li estas pli granda!

*Jos 21:45*

*Ne mankis eĉ unu vorto el ĉiuj bonaj vortoj, kiujn la Eternulo diris al la domo de Izrael; ĉio plenumiĝis.* Li estis fidela!

*Jos 23:14*

*... kaj vi sciu per via tuta koro kaj per via tuta animo, ke ne restis neplenumita eĉ unu vorto el ĉiuj bonaj vortoj, kiujn la Eternulo, via Dio, diris pri vi; ĉio plenumiĝis por vi, ne mankis el ĝi eĉ unu vorto.*

*1 Sam 15:29*

*Kaj la Potenculo de Izrael ne ŝanĝos Sian decidon kaj ne pentos; ĉar Li ne estas homo, ke Li pentu.*

*2 Kor 1:10*

*kaj kiu nin forsavis el tia granda morto kaj forsavos; al kiu ni esperis, ke Li ankoraŭ plu nin forsavos;*

La Fidela Sinjoro estis fidela ekde la komenco. Li batalis por vi. Kiam via fido ŝajne malfortiĝas, nur memoru! Memoru pri la grandaj faroj de Dio. Li faris grandaĵojn por ni. Li savis nin. Li pardonis niajn pekojn. Li pravigis nin. Li savis nin el alkoholo, el drogoj, el malĉasta sekso, el malbonaj kutimoj. Li kunigis nian familion. *Ni memoru! Ĉar Dio estas fidela.*

*Psa 77:11-18*

*Mi rememoros la farojn de la Eternulo; Jes, mi rememoros Viajn antikvajn miraklojn. (12) Mi meditos pri ĉiuj Viaj faroj, Kaj pri Viaj agoj mi parolos. (13) Ho Dio, en sankteco estas Via vojo; Kiu estas tiel granda dio, kiel nia Dio? (14) Vi estas tiu Dio, kiu faras miraklojn; Vi montris Vian forton inter la popoloj. (15) Vi liberigis per Via brako Vian popolon, La filojn de Jakob kaj Jozef. Sela. (16) Vidis Vin akvoj, ho Dio, Vidis Vin akvoj, kaj ili ektremis, Kaj abismoj skuiĝis. (17) Nubegoj verŝis akvon, La ĉielo eligis bruon, Kaj Viaj sagoj ekflugis. (18) La voĉo de Via tondro estis en la turnovento, Fulmoj lumigis la mondon; Tremis kaj ŝanceliĝis la tero.*

## La fideleco de Dio en la estanteco

Estas nenio kion ni povas fari pri nia pasinteco. Estas nur tre malmultege, kion ni povus fari pri nia estonteco. Tio lasas al ni nur la estantecon.

*Jos 23:6*

*<u>Penu do</u> bone, ke vi observu kaj plenumu ĉion, skribitan en <u>la libro</u> de instruo de Moseo, ne forkliniĝante de ĝi dekstren nek maldekstren*

Ni estas gentoj de la libro. La Biblio estas nia Libro. Ĝi estas LA Libro. Kaj tie ni trovas ĉion, kion Dio volas diri al ni: kion ni faru, kion ni diru, kiuj ni estas... Se ni ĉiutage nutriĝas per tiu ĉi Vorto, kaj restas en komuniko kaj rilato kun Li, ni trovos forton por la estanteco, ni neniam forgesos pri Dio.

*Jos 23:8*

*nur al la Eternulo, via Dio, alfortikiĝu, kiel vi faris ĝis la nuna tago.*

*Joh 15:4*

*Restadu en mi, kaj mi en vi. Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton, se ĝi ne restas en la vinberarbo, tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi.*

Li donas al ni la forton plenumi Sian volon. Li montras al ni la vojon. Li donas al ni ripozon nun.

*Jos 23:10*

*Unu el vi forpelas milon; ĉar la Eternulo, via Dio, <u>mem batalas por vi</u>, kiel Li diris al vi.*

En la estanteco li batalas por ni.

## La fideleco de Dio en la estonteco

Ni homoj ĉiam pro io aŭ alio trozorgas. Ni batalas ĉiun tagon por akiri ion kion ni pensas, ke ni devus akiri aŭ atingi. Ni pensas pri la morgaŭo kaj demandas: "Kion mi faru?".

Sed Dio estos ĉiam kun ni, ni ne devus timi.

Li batal<u>IS</u> – batal<u>AS</u> – batal<u>OS</u>
Li sav<u>IS</u> – sav<u>AS</u> – sav<u>OS</u>

En Jos 23:3 ni vidis, ke Dio batal<u>is</u> por ni. En Jos 23:10, ke li batal<u>as</u> por ni.

Sed ni rimarku la versiklon 5:

*Jos 23:5*

*Kaj la Eternulo, via Dio, forpuŝos ilin de antaŭ vi kaj forpelos ilin de antaŭ vi; kaj vi ekposedos ilian*

*landon, kiel diris al vi la Eternulo, via Dio.*

Ĉi tie Li parolas pri la estonteco, pri nia estonteco. En la estonteco li batalos por ni Amen!

Ni legu plie

*Jos 1:5*

*Neniu rezistos al vi dum via tuta vivo; kiel Mi estis kun Moseo, tiel Mi estos kun vi; Mi ne foriros de vi kaj Mi ne forlasos vin.*

*Mat 28:20*

*... Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.*

- Meze de la tento Li donos al ni forton
- Meze de la sufero Li donos al ni konsolon
- Niajn malamikojn Li forpelos (karnon, mondon, diablon)

En la estonteco li batalos por ni

Josuo alkondukis Izraelon en la ripozon de Kanaan. Jesuo alkondukas nin en la ripozon de Sia pardono, de la pravigo, de la justeco.

En la venonta jaro, kaj eĉ ekde tiu ĉi momento, ni rigardu Jesuon; Li estas pli granda ol Moseo, ol Josuo, ol David, Salomono... pli granda ol la templo (Mat 12:6); pli granda ol Jona (Mat 12:41); pli granda ol la anĝeloj (Heb 1:4); pli granda ol niaj malamikoj (1 Joh 4:4); pli granda ol nia koro (1 Joh 3:20).

Li do estis fidela dum tiu ĉi jaro 2007. Li estas fidela dum tiuj ĉi jarfinaj tagoj. Li estos fidela dum la tuta venonta 2008... kaj eterne!

Feliĉan Kristnaskon kaj Novan Jaron!

# Germana memortago: 9-an de novembro

Kompiliis Siegfried KRÜGER, DE

Tri okazintaĵoj en la germana historio estas ligitaj al la dato 9-a de novembro:

1918 proklamo de la respubliko de Weimar,
1989 falo de la muro en Berlino,
1938 en la tuta lando brulis la sinagogoj.

Mi raportas pri la lasta dato, ĉar mi partoprenis solenaĵon “Kontraŭ la forgesemo” en Heilbronn kiel ano de trombonkoruso je la 19-a horo apud loko de iama sinagogo.

Ni bezonas tian ĉiujaran memorigon, por ke ni ne forgesu. Sed kelkjoje ni aŭdas tion ankaŭ alia akcente: Oni devas antaŭen rigardi kaj finfine foje ripozigi

la pasintecon kaj ne ĉiam denove tuŝi malnovajn vundojn. Sur poŝtmarko okaze de 9-a novembro antaŭ kelkaj jaroj oni legis frazon, kiu estas centra devizo de juda ekzisto: La sekreto de liberiĝo/saviĝo nomiĝas rememoro.

Nur kiu rememoras eble liberiĝos de tia spirito de homa malestimo, de tia spirito de rasismo, de tia abomeno de aliuloj, por ni hodiaŭ preskaŭ ne imagebla. Tia spirito torturadis antaŭ 69 jaroj la urbon Heilbronn kaj la judan komunumon. Komenciĝis la laŭplana ekstermado/neniigo de judaj civitanoj, de virinoj, viroj kaj infanoj, kiu kelkajn jarojn pli poste estis realigita en la holokaŭsto.

Okazis ĉielkrianta maljustaĵo. Multaj judaj vendejoj kaj loĝejoj estis arbitre detruitaj. En la fruaj matenhoroj brulis la sinagogo, kiu en 1887 estis konstruita en bizanca-maŭra stilo, unu el la plej belaj en Germanio. En ĉi tiu nokto en Germanio estis preskaŭ 30 000 judaj viroj arestitaj kaj transportitaj en la koncentrejojn Sachsenhausen, Buchenwald kaj Dachau. Multaj estis torturitaj. Preskaŭ 4000 judaj homoj mortis sekve de tiuj malbontraktoj. Gejudoj estis devigitaj forlasi Germanion. Nun montriĝis, ke la naziistoj intencis rapide realigi la en 1935 deciditajn rasistajn leĝojn.


Artoverko: Kupolo de la iama sinagogo

Memorigo ne signifas: Subigi la pasintecon, por pli poste transiri al la kutima tagordo.

Memorigo ankaŭ estas io kiel postportita kunsento rilate al tiuj, kiuj viktimiĝis kaj estis deklaritaj al subhomoj, al malplivalora raso; estis rabitaj de ilia homa digno.

Memorigo ankaŭ estas io kiel postportita omaĝo al la humiligitoj. Tion ni, la postnaskitaj, ŝuldas al ili. Ili estis memkomprenebla parto de la urbo kaj de la societo, ili ja estis Germanoj.

La memoro al la 9-a de novembro 1938 ankaŭ estas esprimo de certeco, ke ne la torturintoj triumfos super la viktimoj. Ĝi estas plendo kaj espero.

Plendo, pri kiu homoj en iliaj iluzioj kapablas, ankaŭ la plej kultivita societo.

Espero al kompensado, al liberiĝo aŭ saviĝo. Ĝi ne estas farebla, estas sekreto.

En la apokalipso de Johano (21,4) tiu sekreto kaj espero estas skribita: *“Kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis”*. ☙

# Informetoj

## Esperanto Diservo.

Esperanto Nederland organizis kun la Esperanto-Societo “Monastero”el Münster en Germanio tutnovan semajnfinan kongreson (19-21 oktobro 2007). La Münstera Societo festis dum tiu semajnfino sian 100-jaran datrevenon kaj Esperanto Nederland organizis ĉiam kulturan semajnfinan kongreson en oktobro.

La temo estis: “Esperanto inter Najbaroj en Eŭropo”. La kongreso okazis en Nordwalde, situante apud la landlimo kun Nederlando (Enschede) en tre bona “Evangelia Junulara Klerigejo”. Dimanĉe matene okazis ekumena edifo en la Evangelia Preĝejo de Nordwalde. Gvidis kaj preparis Els van Dijk kaj Hedwig Fischer. Partoprenis la evangelia pastoro, ne-esperantisto, kiu diris la benajn vortojn je la fino en Esperanto. La gvidilo por la liturgio kiun ni preparis estis *ADORU*. La biblia teksto estis Agoj 4, 32-35 kaj 5, 12-14. Hedwig Fischer mallonge predikis pri la teksto. Partoprenis 25 germanaj kaj nederlandaj esperantistoj. Loka juna orgenisto akompanis.

Els van Dijk-Kuperus

---

## Ĝenerala direktoro de Unesko pri la jaro de lingvoj

Gazetaraj Komunikoj n-ro 274 (2007-12-07)
http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=274

S-ro Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, publikigis mesaĝon pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. En ĝi li skizas la ĉefajn idealojn kaj celojn de tiu speciala jaro, al kiu estos dediĉita ankaŭ la temo de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo en julio 2008.

# Anonima medito

Tradukis: Jacques Tuinder

Mi estas petinta forton...
*Kaj la vivo sendis problemojn*
*por igi min sufiĉe forta.*

Mi estas petinta saĝon...
*Kaj la vivo donis al mi ŝlosilon*
*por solvi tiujn problemojn.*

Mi estas petinta prosperon...
*Kaj la vivo havigis cerbon, muskolojn*
*kiuj ebligas al mi labori.*

Mi estas petinta amon...
*Kaj la vivo donacis al mi homojn*
*urĝe bezonantajn mian helpon.*

Mi estas petinta favorojn...
*Kaj la vivo kreis al mi eblojn*
*kiuj preskaŭ ne konas limon.*

Mi ricevis nenion petitan...
*Sed la vivo enmanigis al mi ĉion*
*kion mi bezonas por iĝi homo!*

